Klaus Groth,

Abendfreden

De Welt is rein so sachen,
As leeg se deep in Drom,
Man hört ni weenn noch lachen,
Se's lisen as en Bom.

Se snackt man mank de Bläder,
As snack en Kind in Slap,
Dat sünd de Wegenleder
Vör Köh un stille Schap.

Nu liggt dat Dörp in Dunkeln
Un Newel hangt dervör,
Man hört man eben munkeln,
As keem't vun Minschen her.

Man hört dat Veh int Grasen,
Un Allens is in Fred,
Sogar en schüchtern Hasen
Sleep mi vör de Föt.

Das wul de Himmelsfreden
Ahn Larm un Strit un Spott,
Dat is en Tid tum Beden –
Hör mi, du frame Gott!

Verkinto de tiu ĉi Basgermana poemo estas Klaus Groth *(∗1819-04-24 – †1899.06-01).*

Arg-553-1114 (2015-01-27 11:46:24)

Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon `http://de.wikipedia.org/wiki/Klaus_Groth`. *Vidu ankaŭ la retejon* `http://lowlands-l.net/groth/`.

Klaus Groth,

Vespera paco

tradukita de Manfred Retzlaff

Silentas mond-bruado,
Samkiel dormus ĝi,
Nek ploro nek ridado
Aŭdeblas tie ĉi.

Samkiel infaneto
Ensonĝe foliar'
Parolas, lulkanteto
Ĝi estas por ŝafar'.

Vilaĝo en mallumo
Nun kuŝas kaj nebul',
Aŭdeblas nur voĉumo
De iu fora ul'.

Bovaro gres-manĝanta
Aŭdeblas tie ĉi,
Kaj eĉ lepor' dormanta
Jen kuŝas apud mi.

Sen bruo, sen kverelo
Nun preĝu ĉiuj ni.
Jen paco de l' ĉielo -
Nin aŭdu, kara Di'!

Traduko de la Basgermana poemo "Abendfreden" de Klaus Groth *(∗1819-04-24 – †1899.06-01) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2012-05.*

Arg-553-1184 (2012-09-03 11:23:04)